



ENDRE ADY

ENDRE ADY

LA MORTO
DE LA ĈIELARKO

Elektitaj poemoj kaj artikoloj

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO

BUDAPEST, 1977

Redaktis: Vilmos BENCZIK

Kovrilo kaj tipografio: Eva FARKAS-TATÁR

Tradukis: Imre BARANYAI

Vilmos BENCZIK

Márton FEJES

Kálmán KALOCSAY

Péter RADOS

Ferenc SZILÁGYI

ISBN 963 571 028 1

Eldonis Hungara Esperanto-Asocio
Respondeca eldonanto: Tibor Vaskó
Presita ĉe Nyírségi Nyomda
Respondeca gvidanto: Zoltán Jáger

ENDRE ADY

1877—1919

Centra figuro de sia epoko estas Endre Ady: de post Petőfi la plej granda poezia kreanto, la plej signifoplena kaj grandformata fenomeno en la hungara liriko.

Ido de malriĉiginta prahungara nobelfamilio (kaj tre fiero pri tio, ke li devenas de la patrujkonkera veziro Ond), Ady portas kun si el sia infanaĝo travivaĵojn de kampara vivo, el siaj gimnaziaj jaroj fortan senton de nacia sendependemo kaj kalvinanan Biblian kulturon. Poemojn li komencas verki jam kiel gimnaziano en urbeto Zilah, kaj pluraj el tiuj ankaŭ aperis en la gazeto de tiu provinca urbeto. En urbo Debrecen, kie li studis juron, li eldonigis sian unuan poemlibron, en kiu ankoraŭ nenio vidiĝas el lia posta verkmaniero: la versoj prezentas tipajn junaĝajn poemojn laŭ la tiama eksmoda modo, en glata formo.

La jur-studadon poste li daŭrigas en Nagyvárad, sed tie li prefere ĵurnalistadas ol studas. Kaj nun li trafas al vivoturno. Nagyvárad, urbo de vigla vivo kaj ekscita moviĝemo, kiu alte superis la nivelon de la aliaj hungaraj urboj, grave influis lin. Tie li konsciigis pri la subevolueco de la hungaraj cirkonstancoj, pri la neeltenebleco de la feŭda reĝimo. Akratonaj artikoloj el lia plumo montras, kiel li fariĝas pli kaj pli liberala, pli kaj pli radikala, klarvida, vaste orientita, brila ĵurnalisto, batalanta sprite kaj impete kontraŭ ŝovinismo, klerikalismo, obskurantismo. En Nagyvárad aperas ankaŭ lia dua poemaro, kiu jam vekis kelkan surprizon, montrante en pluraj poemoj promeson de vere grande poeto.

En 1903 li enamiĝas al bela burĝedzino, kiun en siaj poemoj li nomas Leda. Granda, pasie sensa kaj turmente peri-

petia estis tiu amo: ĝi daŭris, jen harmonie, jen kun intertorturoj, dekon da jaroj, kaj al ĝi dankas la hungara literaturo riĉan nombron da famaj kaj grandaj ampoemoj.

Je ŝia instigo kaj kun ŝia helpo li venas Parizon kaj pasigas tie pli ol unu jaron. Por li Parizo, la „homdensaĵa praarbar’ giganta”, estas liberiga kaj impulsa travivaĵo: ĝia brila kulturo kaj lukso, ĝia libereco, ĝiaj riĉaj eblaĵoj profunde kirlas lian fantazion de juna poeto, plenigas lin per impeta deziro elvivi senbride la vivon kaj per malkontentego pri la hejma senhorizonteco. Sed tiel same li trasentas la internan kontraŭdiron de la burĝa demokratio: li volas atingi trans ĉi tiun. Ĉio ĉi enestas en liaj artikoloj hejmensenditaj kaj ankaŭ en liaj tiutempe verkitaĵoj poemoj, kaj montriĝas jen kiel nietzscheismo kaj malespera senreviĝo, jen kiel vojsercado al la socialismo; ĉi lastan tendencon plifortigas la rusa revolucio de 1905.

De 1906 ĝis 1914 aperas de li ok poemplibroj, krome volumoj da noveloj kaj granda nombro da artikoloj. Jam la unua el tiuj poemplibroj, la „Novaj Versoj”, vekas tutlandan eĥon, admiran kaj malaman. Impetaĵaj bataloj komenciĝas: pastičoj kaj pamfletoj lin atakas, la tiama ĉefministro Tisza fondas eĉ revuon kontraŭ li, en la plej granda konservativa ĵurnalo tuta serio da gvidartikoloj klopodas lin kondamni kaj kompromiti. Liaj admirantoj reagas: la fama revuo „Nyugat” eldonas Ady-numeron. Li fariĝas kvazaŭ standardo de ĉiuj volantaj novon; frontoj stariĝas por li kaj kontraŭ li.

La poeto mem respondas akre al la atakoj, precipe al la akuzo, ke li ne estas bona hungaro. Li sentas ja en si reviviĝon de praaĵ hungaraj instinktoj, spiriton de hungara spito kaj protestemo, eternan hungaran triston kaj aspiron. En liaj poemoj meditantaj pri la sorto de la hungara popolo pli kaj pli montriĝas lia koncepto pri lia poeta alvokiteco. Li volas esti ne solé poeto, kreanto de belaj poemoj, sed ankaŭ profeto, „vates”, juĝisto en la maniero de la profetoj de l’ Malnova Testamento, gvidanto al novaj vojoj. Li sentas sin unu kaj la sama kun sia gento, sakras kaj vipadas ĝin, por elskui ĝin el ĝia stagno kaj apatio kaj movi ĝin por ago, progreso, revolucio.

Lia dua temo estas la amo, ties mil variaĵoj, la nuda elmontro de la granda komplika-konflikta amkroĉiĝo al Leda, en kies figuro li kreas kvazaŭ la eternan/benan-fatalan virinon, la simbolon de la seksa disdubiĝo de la homaro. En multaj poemoj li kantas per la tono de kalvinanaj psalmoj kaj malnovtestamentaj profetadoj pri la morto, forpaso, kaj pri la ekscitiĝo de homo ne povanta rezignacii je la predestiniteco, jen defie procesante kontraŭ Dio.

En lia poezio ardas la tuta sufokaera ekscitiĝo de la unuaj jardekoj de nia jarcento, kun ties revolucia febroy.

Tiu tre individua poeto, en kiu vivas apude sensemo kaj trankvila amrevo, ĉaspelo de mono kaj malamo al „grafoj kaj riĉuloj”, ĉiama atendo de morto kaj sopiro je plena, vera vivo, kreis por si apartan poezian lingvon kaj apartan mondon de simboloj, eĉ apartan prozodion: la akcenton de liaj poemoj difinas la senco, sed oni sentas en ĝi ankaŭ la malnovan hungaran verspulson kaj la tamburetadon de la tempomezura metriko. Lia riĉo je epitetoj, lia varbabundo, liaj propraderivaj aŭ revivigitaj el malnova lingvo vortoj formas lingvaĵon specialan, fortimpresan, tuj distingeblan disde ĉiu alia poeto.

En 1912 ŝiriĝas lia amrilato kun Leda kaj tiu disiĝo ne okazis sen anima krizo. Poste en lia poezio montriĝas spuroj de pasemaj amepizodoj, sed li turnas sin prefere al politika lukto kaj filozofiaj meditoj. Preskaŭ epopea estas lia batalo kontraŭ ĉefministro Tisza, reprezentanto de la hungara reakcio. Pli kaj pli maldekstren li tiriĝas, kaj, kvankam lia malsano sonigas sur lia liro voĉon de trompiĝo, rezigno, rifuĝo, soleco kaj mortodeziro, re- kaj revenas ankaŭ la sonoro de fido, kuraĝigo, revolucia alarmo. Ankaŭ lia tono simpliĝas preskaŭ popolpoeme.

Post la eksplodo de la unua mondmilito, Ady, jam laca kaj malsana, tamen laŭtigas sian voĉon kiel senrezerva antimilitisto, kiel „homo en malhomeco”.

En 1915 li edziĝas al junulino. Dum lia sano pli kaj pli malbone statas, lia poezio ankoraŭ pliprofundiĝas, fariĝante

pli universala kaj pli pura. En liaj tardaĵaj ampoemoj eksonas nova voĉo: la poeto konfrontas la purecon kaj belecon de la nobla ama sento, la feliĉon, la vorton de la ŝirmoserĉa viro al la regno de la morto kaj malhumano.

En liaj lastaj poemoj la voĉo de poeto soleca sed flamanta kaj suferanta por la homaro aŭdiĝas kun la morna forto de la Bibliaj profetoj.

Li ĝisvivis, grave malsana, la burĝan revolucion tiel atenditan. La revolucio solenis lin kiel plej grandan filon de la nacio, kaj kiam li mortis en la januaro de 1919, dekmiloj akompanis lian ĉerkon al la tombejo.

Kiel dum lia vivo, ankaŭ post lia morto daŭris pri li la batalo de opinioj: jardekojn oni diskutis kaj disputis pri lia valoro kaj interpreto. Lia vivoverko estas de epoka signifo en la hungara liriko, kvankam liaj speciale-apartaj formoj kaj esprimoj estas neimiteblaj.

La nuna generacio envicigas lin inter la grandajn hungarajn revoluciajn poetojn: lia granda poezio fidele respegulas la maltrankvilan, ribeleman mondon de la centjar-komenco, ĉiun problemon de la hungara nacio kaj popolo, ĉiujn animkonfliktojn de la moderna homo. Lin, la nobelidon, edukis la burĝa progresemo; kaj li, reprezentanto de la hungara kampularo, pranepo de la kampulribelestro Dózsa, kiel li nomis sin, etendis sian manon al la hungara proletaro — fakte li ĉirkaŭfermis anime sian tutan genton.

Krom tio — li estis tre granda poeto.

1962

Kálmán Kalocsay

* Prononcu: e!ndre a!di

KONSERVI VIN...

Meg akarlak tartani

Jam frenezigas min ĉi bono,
ĉi granda, granda plenumiĝo,
kisa realo kaj sindono.

En via sin' sopire, plore,
mi vin petegas, sinjorin',
en nokton pelu min senkore.

Kiam mi kisas plej ardlipe,
tiam frostiĝu via lip',
min tretu ride kaj mokvipe.

Murdas la amo, se ĝi vivas,
kaj damnas eĉ plej bela nun'.
Mi foriras, ĉar mi tro soifas.

Ĉi voluptarda korp' konstante
sur lit' parfuma de l' paseo
al mi brilegu allogante.

Konservi vin en la animo
mi volas; tial gardu vin
la beliganta Malproksimo.

Mi havu mian songon sanktan
pri la virin' amanta min,
je ŝi eterne sopirantan.

1906

(Kalocsay)

ĈE TIBISKO BORDO

A Tisza-parton

Mi venis de l' Gangesaj bordoj
de l' suda suno kaj revemo.
Kor' mia — kampanulo granda,
mia fort' estas: softa tremo.

Baskul-put', muelej', hakilo,
dezerto, bruo, brutaj manoj,
kisaĉ', kretenoj, rev-murdistoj.
Kial mi venis, Tibiskanoj?

1906

(Rados)

LA ANIMOJ LAZITAJ

Lelkek a pányván

Mian animon oni lazis
pro l' fajra danco ĉevalida.
Ĉar vane ĝin mi batis knute,
ĉar vane estis ĝi pelita.

En Hungarland' se sange saŭmas
ĉeval' lazita en kamparo,
iu ĝin devas liberigi —
animon tristan de madjaro.

1906

(*Rados*)

BATALO KUN LA GRANDSINJORO

Harc a Nagyúrral

Min murdos, sciis mi, min murdos
La porko-kapa Grandsinjor'.
Rigide sidis kaj rikane,
Sur or' li sidis, sur la or'.
Mi sentis, jen decida hor'.

Mi lian naŭzan porko-kapon
Karesis. Tremis li en ĝu'.
„Ekkonu min.” Mi flustris. Truis
Mi kapon mian. Tra la tru'
Li vidis cerbon, ridis plu.

(Ĉu min aventurist' sovaĝa
Li kredas?) Falis mi al ter'.
Sur bord' de l' muĝa viv' ni estis,
Ni, solaj. Ruĝas jam vesper'.
„Necesas oro, ormoner'.”

„Ne eble al mi plu atendi,
Ja povas murdi min moment'.
Por vojo, por plezur' min vokas
Misteraj vokoj, sorĉa tent',
Kaj povas murdi min moment'.”

„Haregoj ŝirmas vian koron.
En mi abscesas pusa ŝir'.
Kaj tamen mia kor' benatas,
La Viv' ĝin mordis, la Sopir'.
Necesas oro. Urĝas ir'.”

„Je mia jaŝt' la mar' atendas.
Kaj tendoj mil atendas min.
Fremda balzamo, fremda suno,
Nova knabino, fremda vin',
Atendas ĉiuj min, ja min.”

„Galopas al mi ĉiu Novo,
Spiregas en mi vivo-tut',
Ĥaoso sankta: miaj songoj,
Kaj viaj songoj: surda mut',
Do krevu brust' por oro-ŝut'.”

Vesper' jam nigris, trista, blinda.
Mi ĝemis. Per la ondo-zum'
Senĉese venis logaj vokoj:
Jen ni. Ĉu estas mono-sum'?
Susuris, flustris ondo-zum'.

Kaj ni ekluktis. Tremis bordo.
En lia karn' per ungoŝir'
Mi gratis, taŭzis. Vane. Vane.
Li ridis. Tintis oroj mil.
Ne eblas ir', ne eblas ir'!

Vesperoj pasis, mil vesperoj.
Sang' mia falas flue for.
De fore oni vokas, logas,
Kaj ni nur luktas kun rigor':
Mi kaj pork-kapa Grandsinjur'.

1906

(Kalocsay)

SUR VINMONTO DE JAROJ FORAJ

Elillant évek szőlőhegyén

Festenas mi sur la vinmonto
De jaroj foraj. Ŝprucas gorgê
De rikoltkantoj gaja fonto.

Min lavas plumba pluvo-frapo
Kaj per ruĝbluaj vinfolioj
Mi kronas min je l' klina kapo.

Vinbranĉoj kuŝas prirabite.
Ebrian kruĉon mi ĝisfundas
Kaj paŝas, supren, fier-spite.

Sur pint' mi eble halton diros,
Sur teron svingos la vinkruĉon,
Kaj bonan nokton mi deziros.

1907

(*Kalocsa*)

PLORI, PLORI, PLORI

Sírni, sírni, sírni

Atendi en la nokto dekdu-bata
Je ĉerko, lante alportata.

Demandon pri l' mortint' ne meti,
Al sekvantaro sonoreti.

Sub tend' arĝenta, nigra tolo
Balanci krucon sen konsolo.

En nigro, peza arĝentumo
Sufoke spiri pro l' torĉfumo.

Kun krakaj ombroj batalante
Obtuzan psalmon ĝemi kante.

Aŭskulti je l' orgen' muĝtrema,
Tombsonorilo profundĝema.

Paŝi tra tombaj kavoj glutaj
Kun nigra pastro, knaboj mutaj.

Rigardi kaŝe, ŝtele, time
Mortinton fremdan, trem-anime.

Frosti sub Luno superstiĉa,
Spiregi en incenso riĉa.

Brust-bati pri l' Paseo brue
Sub sorĉ' fatala, surgenue.

Konfesi ĉion. Kaj kulp-cite,
Sur ĉerkon fali kor-rompite.

Testamenton teruran aŭtori
Kaj plori, plori, plori, plori.

1907

(Kalocsay)

AŬTUNA BRUO

Az ŭszi lárma

Ĉu vi jam aŭdis?
Aŭtune, kiam la nebul' sin tordas,
la vento nokte ies ĝemojn portas.

Nun io bruas,
nun ĉiujn veojn iu al si rabas,
nin iu putrajn ĉerktabulojn frapas.

Malnova homo,
dum viv' lia ĉielo estis blinda,
nun volus disrigardi, kompatinda.

1907

(Kalocsay)

ALFLUGIS LA PAVO ...

Fölszállott a páva

„La domon estraran alflugis la pavo,
Por multaj kaptitoj jen estas la savo.”*

Fiera pavaro, sunpelaj orplumoj,
Kri-krie anoncu: jen novaj plenumoj!

Finfine plenumoj, finfine novaĵoj!
Ridegos al alto, al novaj vizaĝoj.

Vent' nova veigas pra-trunkojn arbarajn,
Ni songas, atendas miraklojn hungarajn.

Ni estas frenezaj? Do venu perejo,
Aŭ vere veriĝos ĉi nia ideo.

Sanktuloj kaj flamoj kaj kredoj nov-novaj,
Vi regu aŭ denove vaniĝu senpovaj.

Aŭ flamo la domon antikvan digestos,
Aŭ nia animo sub jugo plu restos,

Aŭ novan signifon akiros la vorto,
Aŭ restos antaŭa hungara ĝemsorto.

„La domon estraran alflugis la pavo,
Por multaj kaptitoj jen estas la savo.”

1907

(*Szilágyi*)

* *Teksto de hungara popolkanto.*

LA MESIOJ HUNGARAJ

A magyar Messiások

Aliaj estas ĉi doloroj,
estas ĉi larmoj plie salaj,
miloble do estas Mesioj,
se ili estas eĉ hungaraj.

Milfoje ili povas morti,
sed la kruc' neniun savas,
ĉar neniam por ion fari
probablon veran ili havas.

1907

(Rados)

ANTAŬ PRINCO SILENT'

Jó Csönd-herceg előtt

Sub Lun' mi iras la arbaron.
Dentklakas, fajfas mi dumvoje.
Postdorse venas la dek-klafta
Princo Silent',
Ve, se mi rerigardus foje.

Ve al mi, se mi eksilentus,
Aŭ al la Lun' rigardus gape,
Ve-krio, krako. Ekpaŝegus
Princo Silent'
Kaj min frakasmus piedrape.

1907

(Kalocsay)

VIRINOJ SUR LA BORDO

Asszonyok a parton

Staris borde mil virinoj
kun tuketoj, kun bukedoj,
ili ploris, manosignis,
mi — jubilis en la ŝip'.

Vesperigis. En nebulo
staris borde mil virinoj,
sed ankoraŭ flirtis tukoj,
sed ankoraŭ falis flor'.

Nokto venis, nigra kiel
la Paseo kaj la Venĝo.
Staris borde mil virinoj
kaj mi ploris en la ŝip'.

Ĉar nenion mi plu vidis,
nek tuketon, nek bukedon.
Ŝajne estis nur fabelo:
Staris borde mil virinoj.

1907

(*Kalocsay*)

SUR TABLO-TRONO

Ŭlök az asztal-trónon

Sur tablo-trono sidas
Mi, princo de l' Ebri'.
Kaj kapon la falantan
Eklevas supren mi.

L' okuloj grandaj brulas.
Junkantoj en orel'.
Naz', buŝo, koro plenas
Per trink, de moskatel'.

Kaj fulmas, preskaŭ blindigas
Ĉi vina glorfier'.
Mi krias: Voku iun
Ĝemantan en mizer'.

Nun reĝe mi humoras,
La viv' min tuŝis je kor',
Nun mi kompatas kaj amas
Kaj donas en favor'.

Al alkurint' unua
Per mon' sonoretas mi,
Ĝin tutan reĝe, gaje
Al piedoj ĵetas mi.

1907

(Kalocsay)

LA GRANDA KASISTO

A nagy Pénztárnok

— Venu! — diris Kasisto granda
Kaj fluis la or' el la sako —
Venu, mizera homo ĝema,
Jen la pzipago!

Dolor' vin naskis, jen la prezo.
Jen mon', por batpostsignoj blujaj,
Taler-kolono por junaĝo,
Por kisoj fruaj.

Ĉu l' kor', okuloj, spino kriplas?
Dormo mankas? Muĝas oreloj?
Ĉion donitan nun mi ŝanĝas
Je ormoneroj.

Jen tagsalajr' por multa ploro,
Sangmono por la viv' hungara,
Banknoto por la multaj kantoj
Kaj am' amara.

Tro fidis vi, jen granda pago,
Lepro vin kaptis, jen la oro.
Jen la turmento, la espero,
La sang' de l' koro.

— Iru! — diris Kasisto granda
Kaj mi ne povis min forporti.
— Mi pagis, kripla almozul'! Nun
Vi devas morti.

1907

(Kalocsay)

NEĜMONTJOJ KAJ RIVIERO

Havasok és Riviéra

Neĝbuklojn niajn glaciĉapaj
uraganidoj taŭzas bube,
printempo sub ni ridas, palmoj,
alooj, kaktoj floras sube.

En Alpoj estas ni la Limoj.
Nin ventfriponoj moke vipas,
kaj sube sanktan brilon suno,
frenezan bluan mar' disipas.

Fier-turmente ni la kapon
en la ĉielojn frostajn boras,
dum ĉe l' piedoj dand-sinjoroj,
parfumaj damoj ridsonoras.

Ni ŝirmas ilin, ni, la Limoj,
ĉi grandaj korpoj frostrigidaj,
gardante, ke por ili estu
printempaj horoj gaje-ridaj.

Ja mortus, se ni falus foje,
tiu printemp', de l' subo stranda,
ja mortus palmo kaj rideto
sur delikata lipo danda.

Se ni ekzemplon donus grandan
tondre, terure kaj sovaĝe:
montkamaradoj, kio estus,
se ni vizitus ĉi-pejzaĝe?

1907

(Kalocsay)

SANGO KAJ ORO

Vér és arany

Egale sonas al mi ja tute,
volupta spiro kaj stertoro,
se lirlas sang' aŭ tintas oro.

Mi subtenas, scias, ke: jen Ĉio,
ceteraj estas sen valoro:
sango kaj oro, sango, oro.

Mortas ĉio kaj forpasas ĉio,
salajro, gloro, kanto, rango,
sed vivas oro kaj la sango.

Nacioj mortas, ree ekvivas,
benatu ĉies sankta volo
kun mi konfesi: sang' kaj oro.

1907

(Fejes)

MARIA KAJ VERONIKA

Mária és Veronika

De Maria ĝis Veronika
arkas la brakoj de la vir'.
Virinjo, Leda-Veronika,
songi emigas min sopir'

pri infanbrakoj. La okulojn
varmbuŝe kisu nun al mi.
Nun, antaŭ kruco, antaŭ morto
mi rememoras pri Mari'.

Si sendis kise min en vivon.
Mi sciis, kial peli min.
Por viv'. Kaj kio estas vivo?
Ĝoj' pri virin', ĝoj' pri virin'.

Kiu min naskis kaj instruis kisi?
Virino. Ĉe l' krepusk' de l' fin',
Leda, enlulu min. Mi songu
vin esti la patrin', la patrin'.

1907

(Kalocsay)

SONĜO PRI ABELEJO

Álom egy méhesről

Ne Pariz'. Vilaĝsilento.
Riveret'. Odoraj floroj.
Abelzum'. Kaj sub tili'
Rideganta infanar'.
Okulvitroj. Apogseĝo.

En la abelej' malvarmaj
Songoj. Buboĵ, nepoj kiuj
El ingveno mia ĝermis,
Ŝercus, stultus kun petol',
Palpus mian blankan barbon.

Dum vesper' el man' maljuna
Rancan libron mi faligus.
Supre brilas la ĉiel'.
Huŝ jam, dormi, infanar'.
Nun rigardos avo stelojn.

El sub abelej' mi flugus
Tra la mondo, tuta mondo,
En feliĉo, kun ridet',
Side-fluge, kun fier'
Eĉ Parizon mi iradus.

Lun-vizaĝe, kun mil nodoj,
Cent misteroj kaj promesoj,
Venas Vivo, logas min,
Kruĉon kaptas, ridas mi:
For, vi pala sorĉistino.

En la sankta, granda nokto
El animo paca flugus
Puraj, virgaj, fortaj kaj
Ter-odoraj pensoj. Mi
Sendus ilin en la mondon.

1907

(*Kalocsay*)

LA LEĜO DE LA GRANDA MANO

A nagy Kéz törvénye

Ĉu vidas vi, ho fratoj, malĝojantoj,
gajuloj, batalantoj kaj prematoj?
Ŝercema Mano skribis surĉiele:
„Jen la direkto, venu, do, homfratoj!”

Grandega stulta Mano, skrib' senforma.
Jarcentoj kelkaj venas, pasas drone,
generacioj penas, okullacas,
ĝis tiun skribon ni deĉifros bone.

Kaj ni dancadas sub la granda Mano,
kiom da bono mortas ja fiere,
kun sanga kapo, kiom da prabelo,
ĉar ni literojn vidas surĉiele.

La Man', la granda, ŝerca Man' atentis:
ĉu fida Petro ĝin ankoraŭ gapas?
Kaj se la skribon ni jam preskaŭ legas,
ĝi ĝin forviŝas, novan skribon skrapas.

1907

(Kalocsay)

ANTAŬ LA MORGAŬON

A Holnap élébe

Haltu! Hurlas post mi en la nokto
Svarmo ĉifona de l' Hierau.
Haltu! Kaj mi iras, iras.

Haltu! Rompi al densa dornaĵo,
Luno, infero, nigra nuboj
Kaj sola nur, kaj sola nur.

Vok'! Vok'! Mi kuras antaŭ Morgaŭon!
Patro, panjo, pastroj kaj bardoj
Mi puŝas vin, forŝovas vin.

Ombroj, prauloj, hieraŭ-kunuloj,
Fratoj miaj en sango kaj vino,
Naŭza Hierau, postrestu min!

Cel': la Mallum' malĝoja, grandioza.
Haltu! — Ne! Jen antaŭ mi la Morgaŭ!
Min ĝi vokas, min! Mi kuregas!

1907

(Kalocsay)

DE ER' ĜIS OCEANO

Az Értől az Óceánig

Er' — granda, dorma, stranga sulko,
eĉ marĉon ĵunk', kariko rondas,
sed tra Tibisko, tra Danubo
ĝis Oceano Ero ondas.

Eĉ se min falas l' alto skita,
eĉ se cent damnoj sangon tiras,
eĉ se mil talpoj faras baron,
ĝis Ocean' mi tamen iras.

Mi volas, ĉar ĉagrena bravo,
mi volas, ĉar miraj' de l' mondo:
alveni de la Er-rivero
ĝis sankta Oceana ondo.

1907

(Rados)

Er' — laŭ hungara ortografio Ér: rivereto en la naskloko de Ady. La vorto havas la signifon „tre malgranda rivereto”.

FORPORTAS LA SINJOR' KIEL ELION

Az Úr Illésként elviszi mind

Forportas la Sinjor' kiel Elion,
kiujn tre batas kaj tre amas li;
rapidajn ardajn korojn li donacas
al tiuj: veturilojn de Eli'.

Kuregas la Elioj alçiele,
kie eternas vintrofrosta bril',
sur glacipintoj de la Himalajoj
neĝpolvon plugas fajra veturil'.

Inter çiel' kaj tero ilin pelas
la sorta vent' sen hejmo kaj sen ĝoj',
kondukas al malicaj, fridaj beloj
la fajroveturila flugovoj'.

La kor' al ili ardas, cerb' glacias,
ridegas supren al ili la Ter',
la glacivojon komplete surŝutas
la sun' per frosta diamantpolver'.

1908

(Kalocsay)

„KIE VI, ADAMO?”

„*Ādām, hol vagy?*”

Solviĝas korfunebro bruna.
Jen, ĵugi miajn malamikojn,
Mem Dio, en blankbrilo suna.

Li kaŝas vangojn en nebulo,
Sed grandkompate, li jam ofte
Rigardas min per Sun-okulo.

Se foje venkon mi akiras,
Li, Dio swingis sian glavon,
Li, la Sinjor' min antaŭiras.

Lin tra l' animo paŝi mi aŭdas.
Je l' trista „Kie vi, Adamo?”
Kor-batoj bruaj respond-laŭtas.

Mi trovis jam Lin en la koro.
Mi trovis jam kaj ĉirkaŭprenis.
Unuiĝos ni en la mort-horo.

1908

(*Kalocsay*)

ĈE SINISTRO DIA

Az Isten balján

Dio iel ekzistas ĉie:
en sub' de ĉiu Penso nestas.
Al Li ni sonorigas ĉiam,
mi ĉe Lia sinistro estas.

Dio estas mizerikorda,
Li mute, nevideble adas,
nur per pezaj sonoril-langoj
en nian koron iam batas.

Dio neniam venas nin
por helpi nin en la mizero.
Di' estas: Mio kaj doloro,
la plan', la kis' — ĉio sur tero.

Li estas grandega Moŝto,
Li estas helo kaj obskuro,
Lin al anim' miljaroj portis,
Tiran' Li estas kaj teruro.

Dio estas la pleja simpla,
Lin tudas homoj tro bonemaj,
Lin tudas la maltrankviluloj,
revantoj grandaj, multproblemaj.

Dio, ve, ne amas min,
ĉar mi Lin serĉadis multe,
antaŭ lin trovi, mi kun Li
kverelis kaj konkuris stulte.

Dio iel ekzistas ĉie:
en sub' de ĉiu Penso nestas.
Al Li ni sonorigas ĉiam,
mi ĉe Lia sinistro estas.

1908

(Rados)

KRUCIFIKSO EN ARBARO

Krisztus-kereszt az erdön

Arbare neĝa krucifikso:
En granda, luna nokto vintra:
Memor' malnova. Tie portis
Min foje sledo gaje tinta
En granda, luna nokto vintra.

La patro, gaja vir' ankoraŭ,
Rigardis ĉiun krucon kante.
Kaj mi, la fil' de mia patro,
Skulptitajn bildojn enuante,
Rigardis ĉiun krucon kante.

Du spitaj, skitaj kalvinanoj,
Kiel la Tempo ni rapidis.
Patro kaj fil': unu Jes, unu Ne,
Ni flank-ĉe-flanke kante sidis,
Kiel la Tempo ni rapidis.

For dudek jaroj. Kaj en penso,
Nun mia sledo glitas tie,
Kaj, kion tiam mi neglektis,
Mi la ĉapelon levas pie.
Nun mia sledo glitas tie.

1908

(Kalocsay)

LA ALVENO DE DIO

Az Ūr ĕrkeze

Dum, forlasite,
Mian animon mi jam fale trenis,
Silente, jen, kaj senatende
Min Dio ĉirkaŭprenis.

Ne kun trombonoj,
Sed kun muta, vera, ĉirkaŭpren' benita,
Kaj ne en bela, fajra tag' li venis,
Sed en nokt' milita.

Okuloj miaj vantaj
Blindigis. Mortis la junec' sinsterne,
Sed Lin la briln, Lin la grandiozan
Vidas mi eterne.

1908

(Kalocsay)

LA TROMBONO DE DIO

Az Isten harsonája

Se l' subpremitoj, se la neniuloj
Veante venos kun batala fero,
Mem venos Dio kaj milmil' da ombroj
De Fort' kaj Ĝoj', mortintaj en utero,
Veante venos kun batala fero.

La mortigantoj de la Fort' kaj Ĝojo
Ne havos plu indulgon en perejo.
Jarmilojn kelkajn Dio ja toleras,
Sed poste, ve al ili, granda veo!
Ne estos plu indulgo en perejo.

Ĉar Dio estas mem la Ver' de l' Vivo,
Ordonas: ĉiu vivu, vivon semu,
Ordonas Lia estas: ĉiu ĝoju,
Ordonas Li: ĝojmortigantoj tremu!
Ordonas: ĉiu vivu, vivon semu!

Alvenos Dio, Li, la praa Vivo,
Tramuĝas Li la teron per trombono:
Mortintaj, vivaj kaj naskotaj homoj,
Jen, mi alvenis por la Justo-dono,
Tramuĝos Li la Teron per trombono.

Kiuj per larmoj de l' aliaj vivis:
Pereos en terur' kaj abomeno.
Forfalos kiel putraj bestkadavroj
Tiranoj en tombar', nuntemp', ingveno,
Pereos en terur' kaj abomeno.

1908

(Kalocsay)

KANTO DE HUNGARA JAKOBENO

Magyar jakobinus dala

Se nin vi palpas, sango gutas
al ni el sub la fingrorand'.
Ĉu do vi vivas, ĉu ni vivas,
dormema, povra Hungarland'?

L' animo veas, ĉu plibonon
atendi eblas, ĉu l' Babel'
de la popoloj da servistoj
vekiĝos iam por ribel'?

Kial el mil sopiroj svenaj
ne iĝos unu volpersist'?
Hungara trist', rumana, slava
ja ĉiam restos unu trist'.

Ja de mil jaroj jam parencas
kaj nia hont' kaj nia ve'!
Kial ne renkontiĝi hurle
sur barikadoj de ide'?

Danub' kaj Olt ja same zumas
per surde softa, morta son':
en land' Arpada ve al ĉiu
ne-grandsinjur' kaj ne-fripon'.

Do kiam fine ni kuniĝos
por granda vort' kaj granda far',
ni, subprematoj, frakasitoj,
ni, la hungar' kaj ne-hungar'?

Ĉis kiam ŝimos ni, milionoj,
kaj estros la bandit-kuraĝ'?
Ĉis kiam la popol' ĉi-landa
estos sturnido en la kaĝ'?

Ho land' de tristaj almozuloj,
nun mankas fid', nun mankas pan'.
Jam morgaŭ ĉio estos nia,
se volas kor', se riskas man'.

1908

(*Kalocsay*)

LA STELO DE STELOJ

A csillagok csillaga

Neniam falos stel' la ruĝa;
Jam falis sun' kaj ĉiu stelo,
Sed ĝi firmas sur la ĉielo.

Falanta stel' ne estas ruĝa,
Sed blua, verda aŭ dub-hela.
Tio estas leĝo ĉiela.

Falu steloj, falu milope,
En mil falegoj, veo, ploro.
Eĉ per unu venos aŭroro.

Vi tronu brile, ruĝa stelo.
De kiam sentas hom' mizeron,
Ruĝa stelo donis esperon.

1908

(Baranyai)

NEPO DE GEORGO DÓZSA

Dózsa György unokája

Nepo de Georgo Dózsa mi estas,
Popolamanta, ĉifona nobelo.
He, grandsinjoroj, atentu popolon
Falĉilan mian, ĉar ardas Somero.

Somero ardas, falĉiloj rektas.
Grandsinjoroj: aĉaj pugnoj blankaj,
Kio do, se vaga pleb' de Dózsa
Furioza fluos atakanta?

Grandsinjoroj, se venos popolo,
Kien fuĝos via rabist-hordo?
Se ni kun bruo la pordegon
Fermos ĉe l' fuorto?

1908

(Fejes)

MORTOFLOR': LA KISO

Halálvirág: a csók

Per ĉar' de nigraj papilioj
Mi iros al la kiso lasta.
Mia virino: Mortoflor'.
Nekonatin', aŭtuna roz',
Floranta je l' printempo ĉasta.

Ho Mortoflor', se l' Maja Luno
Unue sur ĉiel' sin levos,
Min lulos via mola lit'.
Atentu bone, Mortoflor',
Petaloj ĉiuj brili devos.

Malfermu sanktan korpkalikon
Al Luno, ke ĝin frapu miro,
Dum korp' al korpo gluos sin,
Vibrigu ĉion tra l' ĝarden'
Muziko nupta de l' Sapiro.

Floretoj flustru time, treme:
Jen kis-Lazaro multe-fasta.
Kvankam kis-estro estis li,
Lin ne renkontis inda kis'.
Li kisas nun je l' fojo lasta.

Okuloj, haroj, brakoj ardu,
Buŝeto, koksoj, brusto dia,
Velurpiedoj, tuta Vi.
Dolĉiĝu per vi, Mortoflor',
Ĉi lasta, lasta amo mia.

La ĉar' de nigraj papilioj
Returnu sin sen mia porto.
Vi ankaŭ kuru, Mortoflor'.
Ne sciu, kion mi en sol'
Interparolos kun la Morto.

1908

(Kalocsay)

POST MAJA PLUVEGO

Májusi zápor után

Nebulis fore fagarbar'
vaporis kampo, ŝvelis flu',
subite en mia laca korp'
tie, sur pluvbatita verd',
ekkantis sang' per ruĝa bru',
ekkantis sang' per ruĝa bru'.

Susuri ŝajnis herbokresk',
sonoris suno, sparkis Hel',
saltkreskis branĉ', ekfloris hum',
ekdancis Ter' kaj Firmament'
kaj kisis ĉio sub ĉiel',
kaj kisis ĉio sub ĉiel'.

L' okulojn urbajn, vibrajn mi
forfermas de ĉi kis-ebri'
kaj maltrankvile, treme kaj
mallaŭte preĝas mia kor':
Ĉi kisan kampon benu, Di',
Ĉi kisan kampon benu, Di'!

Ĉi tie, tie virinar'
pioĉas, vivon plantas plu.
(Ho, vivi tamen bone ja!)
Virinoj junaj, fortaj, kaj
la kruroj nudaj ĝis genu',
la kruroj nudaj ĝis genu'.

1908

(Kalocsay)

FRENEZA, MORTA NOKTO

Bolond, halálos éj

Al nord' rigardas fenestreto,
La sola grinca fenestreto.
Ekstere maro blekas. Mi
Aŭskultas je l' kor-orkestro:
Kiaj frenezaj du muzikoj!

Tre fore grandaj montoj brilas,
Sang-ombroj, neĝaj montoj brilas,
Jam noktas. Verdas mara ŝaŭm'.
La ĉambro blankas. Ho, mi iras:
Jen nokto en frenez-koloroj!

L' odoron de la mimoz-floroj,
Benataj, dolĉaj mimozfloroj
Alportas flugilfrap' de vent'.
La mond' nun plenas de odoroj:
Kia freneza odorar'!

Ĉu fajron manĝis nun la Luno,
Ĉu flamon manĝis nun la Luno,
Ĉeval', maljuna de l' ĉiel'.
La nuboj ardas en ruĝbruno:
Kiel fajriĝis nun la mond'!

Mi iros, iros: jen la Morto.
Mi scias, scias: jen la Morto.
Min vestas, pord-malfermas mi,
Li baras vojon en la pordo:
Kia freneza, morta nokt'!

1909

(Kalocsay)

LA MORTO DE LA ĈIELARKO

A szivárvány halála

Neniam ĉielark' pli brila
ĉielon ringe ĉirkaŭprenis,
neniam tiel vasta ark',
sed jen, jam vespero venis.

Rigardi, gapi jam enuis
kampuloj, birdoj, brut' kampara,
okuloj, pugnoj hontis jam,
kaj jen moliĝis ili nun
pro nura ĉielark' vulgara.

La Sun' maljuna dum subiro
okulis moke je l' spektaklo.
Ĝin plaĉis ja, ke vekas nun
sur tiu sobra, sterka kamp'
admiron ĉi kolormiraklo.

La ĉielark' ankoraŭ brilis,
ĝi eĉ beliĝis dum ekpalo,
rigardis plore al la kamp'.
Kolorojn ĝiajn sanktajn nun
eksorbis fine nubvualo.

La Sun' maljuna ride dronis,
ekspiris malpeziĝe ĉio.
Ne estas por la ŝvita kamp'
tia majesta, sankta kaj
freneza ĉiel-komedio.

1909

(Kalocsay)

SUB LA MONTARO NEĜARGENT'

A Hóvár-bércek alatt

Sub la montaro Neĝargent',
Sub sorĉ-montaro Neĝargent',
Ŝaŭmbruas tra l' arbar' lunluma,
Ŝaŭmbruas tie la ama torent',
Ŝaŭmbruas tie la profundakva
Kaj la senponta monta torent'.

Sub la montaro Neĝargent',
Dum lumas Luno, kaj surbranĉe
Dancas petolaj gnomoj cent,
Atendas min ĉiun noktmezon
Junul-taĉment', knabin-taĉment',
Duborde po unu arda taĉment'.

Sub la montaro Neĝargent',
Atendas ponton junul-taĉment',
Kaj el la lit' min ekflugigas,
Min alflugigas virina tent'.
Ektuŝas tie frostrigida
Dormanto en noktmeza moment'.

Sub la montaro Neĝargent',
Mi estas pont', rigidiĝinte,
Tra l' verde brila monta torent',
Per ardaj, blankaj piedetoj
Sur mi trakuras knabinoj cent,
Al amato kuras knabinoj cent.

Sub la montaro Neĝargent',
Noktmeze kantas monta torent',
En la densaĵ' de miaj songoj
Mil kis-fabelojn ridas la vent'.
Amparoj ĝemas kaj spiregas,
Ĝis matenruĝas la orient'.

Sub la montaro Neĝargent',
Sub sorĉ-montaro Neĝargent',
La nokta pont' kun trunk' rompita
Disfalos en fatala moment',
Kun peza ŝarg' de knabinoj kisaj
Subfalos al la monta torent'.

Sub la montaro Neĝargent',
Ankoraŭ kantas verda torent',
Noktmeze sur ŝancela ponto
Trakuras nudaj knabinoj cent,
Ankoraŭ ŝaŭmas ama torent',
Ŝaŭmbrova, trista monta torent'.

1909

(Kalocsay)

LA DRONINTAJ VOJOJ

Az elsüllyedt utak

Min vokis kampo de l' sekretoj,
Sin glataj vojoj proponis cent.
La pordon mi frapfermis kante
Post mi, kun junfanfarona sent'.

La vojoj kuris al la supro,
Abunde brilis la kampa flor'.
Trankvilan korton mi forgesis,
Ebrie, kante mi kuris for.

Mi kuris kante, blindebrie,
Odroj novaj ensorçis min.
Sur vojoj cent mi ne rimarkis
Ke mi jam venis al vojo-fin'.

Nenie hejm' malnova. Dronis
En densa nokta-nebula blind'
Kamp', vojo, flor', odor' kaj korto,
Pord', fido, kanto, ebri', pasint'.

Arbustoj jen-jen min faligas.
Inter memoroj kaj sub terur'
Mi vadas en blindnigra stepo
Tra mia sorto, tra l' nokt-nebul'.

Jam dronis çiuuj vojoj reen
Al la malnova trankvila kort'.
Tre fore, en nebulo grincas
Maljuna malfermadata pord'.

1909

(Szilágyi)

PETEGO PRI RIDO

Könyörgés egy kacagásért

Vizaĝon vian konas mi el
Kolera nub', Sinjoro.
Al mia vid' ĝin portis fulmoj,
Mi ofte lavis ĝin en ploro.

Ve, mi ne vidis ĝin radia,
Kia ĝin multaj vidas.
Ho, sankta Dio de la Rido,
Min kial, kial vi evitas?

Sinjur', malsatas mi la gajon,
Soifas ridon vian,
Adepton gajan, arlekenan
Vi ja neniam havus tian.

Pasinton mian aŭdu mi per
Belega rid' eksoni,
Mi vidu viajn vangojn gajajn
En sankta, rida ploro droni.

1910

(Kalocsay)

IU NUN, IU NUN MIN MEMORAS

Valaki, valaki emleget

Iu nun, iu nun min memoras,
Ĉar mi estas tre plòrema,
Antaŭ mi Parizaj stratmontoj
La ĉielon traboras,
La kurtenon de la nebuloj.
Gajaj junuloj
Venas kantante
El profund' de l' stratoj nigraj.
Kiujn serĉas pensoj migraj?
Estas vane!
Iu nun, iu nun min memoras,
Kien mi foras,
Estas voj' el stratprofundo
Al ĉiel' vundata sankta?
Sekvas min la voĉo kanta
Kaj mi trovas plu en nokto.
Tiun, kiu min memoras,
Serĉas mi en mia koro,
Tiun, kiu primeritus,
Ke el strat' mi stelojn vidus,
Ĉiam stelojn, kiuj foras.
Iu nun, iu nun min memoras,
Kompatas min,
Tiun kompatas,
Kiu ŝetite al nigraj Parizaj
Stratoj la stelojn ŝatas.
Mi ploras
Pro la noktaj kaj gajaj kantoj,

Kiujn nun kantas
Ĉifonitaj, tamen ne solaj
Gajaj, junaj kunkantadantoj.
Iu nun, iu nun min memoras,
Ĉar mi estas tre plorema,
Antaŭ mi Parizaj stratmontoj
La ĉielon traboras.

1910

(Szilágyi)

LA ŜTELINTO DE MIA SORTO

A sorsom ellopója

La ŝtelinton de mia sorto
Mi vidis,
En Japanuj' aŭ Ameriko,
Mi ne memoras:
Songe mi vidis.
Li rikoltis: riĉa garbaro
De rezultoj antaŭ li.
Li junis, kvankam ankaŭ li
Kiel mi, estis, en la tridektria
Jaro.
De eksploda forto li ŝvelis,
Kiam hejmenvenis li el la
Laboro,
Tiam kisis junan edzinon
Fajre en la freŝvespera horo;
Ludis infanar' en ĝardeno.
Kun ĝemo,
Mi staris tie sub sortopremo,
Almozul' kun sama vizaĝo,
Aĝo,
Kaj, ebria de la vivo
Li gajege min regalis
Per pomvino, pano, fromaĝo.
Kuŝejon pajlan oni metis
En korto,
Kaj kriples gardis mi la paradizon.

Ne diris mi, almoza gasto,
Ke mi mem povus esti mastro,
Sen vorto
Mi la piedojn ekirigis
Al la malĝojaj landovoj,
Rifuĝis mi, kurante, lame,
De sortŝtelinto mia, porĉiame.

1910

(*Szilágyi*)

REMEMORO PRI NOKTO SOMERA*

Emlékezés egy nyár-éjszakára

Tamburis ĉefangĉel' kolera
Al Ter' alarmon furioze,
Junuloj frenezumis ame,
Kaj estis svarma falo stela,
Kaj virgokufoj falis same.
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ekbrulis nia abelej',
Piedrompis ĉevalid' plej bela,
Vivis mortint' en mia song',
Perdigis nia hund' fidela,
Kaj nia muta servistin'
Ekkantis, jen, per voĉo kvera:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Friponoj fierfanfaronis,
Rabis eĉ rabist' delikata,
Kaj kaŝis sin la homo vera;
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ni sciis ja: la hom' falemas,
Estas tre ŝulda pri la amo,
Tamen, tre strangis nun ĉi turno
De l'nuna, fora mondo tera.
Neniam la pun' pli moka estis,
Neniam la hom' pli nanmizera,
Ol dum ĉi tiu somernokto:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.

Terur' sin klinis sur animojn
Kun malicega ĝoj' infera,
Obsedis ĉiun fat' mistera
De ĉiu antaŭulo lia.
Al fest' terura, sangebria
Ebrie iris nun la Penso,
Servist' fiero de la Homo,
Kaj nun, jen, kripla kaj mizera:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.
Ho kredis tiam krede mi,
Ke ia neglektita Di'
Revivos, portos min en morton.
Kaj jen, ĝis nun mi vivas, tia,
Kia min faris tiu nokt' magia
Kaj Di-atende mi memoras,
Memoras tiun mond-dronigan,
Teruregan somernokton:
Unika,
Unika estis ĉi nokt' somera.

1918

(Kalocsay)

* *La nokto de la eksplodo de la unua mondmilito.*

LA GRANDA DIBOĈO

E nagy tivornyán

Ter-tablo pretas: manĝu sataj.
Furoru Mond'. Nun liberiĝis
Ĉiuj geĥenoj de l' geĥeno.
Vole-ne-vole, jen festeno:
Kun korvoj kaj kun vagaj hundoj
Festen' komuna, ligoj frataj.

Jen, sanga vin', kranipokale,
Ĝin trinku, Mond', ĝisfunde leku.
Trinku, heroe. Nun, egale,
Egale jam. Nun trakuregu
Sangverdan vojon de l' Frenezo.

Frenez', ne hontu sub vualo.
Ŝiriĝas ligoj, falas ŝnuroj.
Jen la revita Tut-Egalo,
Je l' Tut-Permeso sonu ĵuroj.
Diablon nia haŭt' malpura
Apartenas. Drinki! Kaj — hura.

Se ni komencis, ni diboĉu.
Egale, ĉu ni vivas, mortas,
Ĉu l' homo timas, aŭ heroas,
Egale, ĉu l' malbono troas,
Aŭ restis io estiminda.

Ja miaj botoj de heroldo
Kotiĝis, sed mi ĝojanoncas.
He, krii urbo, hurlu pordo,
Damnigu, jen la ĝusta horo,
Se iu fidus je l' aŭroro,
Ne mortu tiu sen damniĝo.

Solviĝis tuta mondteksaĵo.
Ĉu do mi, kriplo torporanta,
Plu pendas sur mizera maŝo?
Pasinton zorgi? Zorgo vanta.
Ter-tablo pretas, manĝu sataj
Ĝis-kreve ĉe l' diboĉ' giganta.

1918

(Kalocsay)

ADMONO AL LA GARDANTOJ

Intés, az őrzőkhöz

Gardantoj, gardu sur posteno.
La noktoj estas stelo-ŝutaj.
Lampiroj vibraĵoj en ĝardeno,
Memoroj pri someroj foraj,
Somer' Florenca; kaj en ĉeno,
Memoroj pri l' aŭtuna Lido,
Pri l' karaj balaj balaaĵoj
En la vapora ĉambro de l'
Adiaŭbalo, je mateno.
Kaj ĉiuj beloĵoj, vivoj, kantoj,
Eterne vivaj mortaj horoj,
Ĉiuj mortintoj kaj vivantoj,
Kaj malproksima rid' de koroj,
Vin petas orfe, en ĉagreno:
Gardantoj, gardu sur posteno.

Gardantoj, gardu sur posteno.
La Vivo vivas, vivi volas,
Ne tial ĝi per beloĵoj multaj
Nin benis, ke tra ili vadu
Ĉi diabloj sange-stultaj.
Dolore estas esti homo,
Teruras bestheroaj diroj.
Stelŝutaj noktoj kaj lampiroj
Tamen ne lasas nin forgesi
Pri l' Fid', ŝpinita en la Belon.
Gardantoj, gardu sur posteno.

1918

(Kalocsay)

KANTO KRONIKA EL 1918

Krónikás ének 1918-ból

Aĵoj teruregaj nune okaziĝas,
Gentoj kontraŭ gentoj are amasiĝas,
Homoj bonaj, kulpaj same maldolĉiĝas,
Fidoj de la homoj ege malfortiĝas.

Homloĝejoj longe jam ne konstruiĝas,
Koroj, hejmoj, cerboj, ve, tre detruigiĝas,
Tion ĉi legante certe konsterniĝas
Ĉiu, kies kor' je bonaj sentoj riĉas.

Ve, ke belaj revoj tiel do finiĝas,
Ve, ke ĉiuj ĉe ni jam sub jug' kliniĝas,
Ve, ke jam neniuj entuziasmiĝas,
Tamen en ĉi fremda interflam' bakiĝas.

Jen, jam sangriveroj ĉe ni transbordiĝas,
Ĉiuj estiĝontaj ege malmultiĝas,
Pramalnovaj damnoj plie amariĝas,
Kio, ve, fariĝas, kio prepariĝas?

Sonas violonoj, eĉ pli ol sufiĉas,
En diboĉ' malkara mil kaj mil miksiĝas,
Aĉaj banditvangoj brile helruĝiĝas,
Mildaj terurite fuĝe rifuĝiĝas.

Lampaj belaj kapoj stulte jam sveniĝas,
Homaj homoj ege enabomeniĝas,
Homoj ĵus junaĝaj je hop' maljuniĝas,
Terloĝant-kadavroj monte kunkuniĝas.

La patrinoj palaj plore akuŝiĝas,
Pilkludantaj knaboj sub la mort' kuŝiĝas,
Belaj prafajrujoj vice senbruliĝas,
Virgulinaj karaj alstratanguliĝas.

Povraj homoj tamen nur ne satnaŭziĝas.
Ili stultas, lacas. Rare ĝoj' kaŭziĝas.
Al la povraj homoj ĉio malfortiĝas
En memoro. Ili mortigas, mortigas.

Kompatindaj homoj mortigas, mortigas,
En la songoj febraj ĝoje konkordiĝas,
Post vekigo ree rabi-malsaniĝas
Kaj damniĝas, mortas, sovaĝul-naniĝas.

Mortkampe pendingoj multaj rigidiĝas,
Grandaj grasaj korvoj sur la pint' sidiĝas,
De homkarn' tediĝas, for-kaj rebatiĝas.
Sed la homoj tamen nur ne naŭzatiĝas.

1918

(Kalocsay)

AŬTOBIOGRAFIO

Önéletrajz

Laŭ-geografie mi venis el la regiono Szilágy, el la malnova landparto Partium, do nek el Transilvanio, nek el Hungarlando. Laŭ-familie same, nek de supre, nek de sube, el baraktanta etnobela familio, kiu dum mil jaroj apenaŭ nur vivis. Iam, laŭ malnovaj dokumentoj, ni estis eminenta kaj riĉa familio, sed jam en la 15-a jarcento nur „nobeloj kun sep prunarboj”. Nur mult-ĉevalpova orgojlo atestas jam en nia animo, ke kun pli da lerto ankaŭ ni povus nun figuri dinastio. Laŭ la patrina genealogio mia praularo senescepte konsistas el pastoroj kaj homoj studemaj kaj poitemaj, ekde la tempo de la protestantismo ĉiuj kalvinanoj. Mia avo laŭ-patrina servis kiel pastoro en la vilaĝo Érmindszent, en la vilaĝo, kie mi naskiĝis; mia patro venis ĉi tien al mia patrino el la interna parto de la Szilágy-regiono. Mi havas nur tridek unu jarojn, pri kio mia doktoro, la multescia Konried inde miras, ja miaj sango, korpo kaj nervoj estas danĝere kadukaj. Mi portas en mi folan sentemon frue manifestiĝintan: frue mi komprenis, amis kaj suferis. En mia infanaĝo min ensorĉis la fabeloj: poemojn mi ne ŝatis kaj nur pene parkeris la psalmojn. Tamen mi verkis poemon eĉ antaŭ ol koni la majusklojn: mallongan, sed brile mokan baladon pri tio, kiel falis en la koton Lajos, mia pli juna frato. La unua poemlibro, kiun mi havis, estis „Legendoj” de Sándor Kisfaludy; ĝin donacis al mi iu el miaj fatalaj onklinoj, kiam mi havis ok jarojn. Tiun libron mi ŝatis, sed „Himfy” eĉ kiel plenkreskintan studenton ne povis allogi min, kaj min konkeris por la versoj „Tasso” de Goethe kaj János Vajda: mi aĝis tiam deksep jarojn, kaj, kiel membro de la lerneja memkleriga rondo, mi jam makulstampis mian nomon per multaj poemoj. Mia unua poemo presiĝis en la jaro 1896, en la gazeto

„Szilágy” de la urbo Zilah: ĝi estis patriotisma poemo, pri Lajos Kossuth. Sed jam en la jaroj 1890—1891 kelkope ni fabrikadis manskribitan gazeton en la gimnazio ĉe la Ordeno de Piuloj, en la urbo Nagykároly. Nepre mi estus homo kun alispeca animo, se ne jam en la vilaĝo oni igus min ŝanĝi la kalvinanan lernejon je katolika. Kaj se post la katolika monaĥa gimnazio ne ĉirkaŭus min denove kontraŭa medio en la kalvinana kolegio de Zilah. Mi estis elstara lernanto, eminentulo, eĉ, la unua inter la eminentuloj; min bridis tristaj aferoj kaj rememoroj de la familio. Sed eĉ tiel ne mankis plendoj pri mi, kaj kiam en Debrecen, kiel studento pri juro, mi aliĝis al la redaktistaro de gazeto, escepte mian povran martiran patrinon, ĉiuj sentencis: finita. El Debrecen, kie oni ne emis vidi en mi eĉ la plej etan fraton de Csokonai, kaj kie aperis mia unua poemplibro, mi iris al Nagyvárad por labori kiel ĵurnalisto. Tiu vibrema, judloĝata, inteligenta urbo transformis en mi multon, elformitan far la vilaĝo, Nagykároly, Zilah kaj Debrecen, do far la vilaĝo. Sed ĉi tie spasmigis miajn fingrojn iaspeca obstina ciniko: ne indas verki por fariĝi fine József Kiss. Mi faris gazeton, verkis ĉefartikolojn kaj evidente mi pereus aŭ komencus terure prudentan vivon, se iu ne venus por mi. Ino tiu estis, ŝin sendis al mi unu el miaj poemoj, kiu trafis en ŝiajn manojn, kaj ŝi prenis mian manon kaj ne haltis kun mi ĝis Parizo. Tiam ŝi trudis al mi sian volon, sian sterilan vantecon, por ke ĝi ĝermu en mi, se ĝi povos. Pasis jam kvin jaroj ekde tiam, eĉ, baldaŭ ses... Ekde tiam mi verkas, batalas, svenas kaj rekomencas: mi ekzistas. Majstrojn mi ne havis, mi ne bezonis havi majstrojn, ĉar mi vivis kaj profunde mi sentis la vivon. Mi sentis, volis, plene, multobligite: pro tiu granda, senbrida vivovolo balancas la kapon miaj doktoroj, kiam ili ekzamenas min. Mi volis eldiri ĉion, kio povas lanĉiĝi en nuntempe vivanta hungara homo, ĉion, kio nuntempe pelas vivulojn, kiel rimeno la radon de maŝino. Nun mi jam povas konfesi: mi kredas min konscienco de la nuntempa hungararo, de la kultura hungararo, kaj tiu konscienco ne povas esti ĉiam pura. Esence mi scias, kion mi faris ĝis nun, kaj ankaŭ tion mi scias, kion mi ankoraŭ povus fari, se mi havus eblojn. Nun mi ne pretendas ankoraŭ, ke oni vidu min tio, kio efektive mi estas, kaj mi mem ne volus, ke mi estu

Endre Ady konata aŭ fama pro miaj veraj valoroj. Nun ankoraŭ mi volus gajni de la vivo tri-kvar pliajn tolereblajn jarojn, kaj mi volus, ke mi povu bone dormi kaj verki kelkion, kion povas verki nur mi. Kaj ke sinjoro doktoro Konried la sekvan semajnon, traekzameninte min de la piedoj ĝis la verto, rigardu al mi pli trankvile, pli kuraĝige. Kaj ke miaj malamikoj — al kiuj plej multe mi ŝuldas, ĉar ili vekis en mi obstinon, orgojlon kaj forton preskaŭ superhoman — ankaŭ estonte instigu min.

1909

(Benczik)

MALGRANDA PROMENO

Egy kis séta

Dum dimanĉaj posttagmezoj oni ne laboras, do bonvolu fari malgrandan promenon. Ni ankaŭ diros: kien? Tien, kie ni promenis hodiaŭ.

Proksimiĝas majo. Ankaŭ la verdantaj kaj florantaj arboj allogas. Bonvolu promeni al la Schlauch-parko, kaj al la tiel nomata Kanonika strato.

Neniun ŝoku la dukapa aglo sur la episkopa katedralo. Ŝajne tiun mizeran trudaĵon ni devas toleri sen kolero.

Sed rigardu la Kanonikan straton kaj pensu.

La ŝtroj de la ekskluzivaj, afektecaj, bonstato radiantaj palacoj estas mallevitaj. Iliaj loĝantoj estas la plej senutilaj, nenifaraj homoj. Kiu el inter ili laboras, tiu eĉ ne estas ĉi tie. Ekzemple, Wolafka laboras. Li semas eklezian batalon, revolucion en la kalvinana Romo. Tiu graso, dikpufa pastro, kiu estas plena de forto, sango kaj fanatiko, malutilas al la hungara socio kaj al la hungararo pli, ol naŭdek agitantoj socialistaj kaj mil dukapaj agloj. Kaj malutilas ankaŭ ĉiuj ceteraj, senescepte, ĉar ili formangas la panon de multaj miloj de malsatantoj.

Mallonge: jen, tia estas la Kanonika strato.

Kaj poste promenu al ajna parto de la suburbo. Sed fortigu vian koron. Ĉar vi vidos mizeron, krimon kaj malpuron. Vi ekvidos, kiom da mizero povus esti mildigita, kiom da larmoj povus esti forviŝitaj per la mono de la kanonikoj.

Se vi ekvidos kaj pripensos ĉi tion, la dimanĉa promeno estos rezultoplena.

1901

(Benczik)

STROFOJ

Strófák

Kiam denove descendos la bruna nokto, kaj kun ĝi descendos la animoj de la Bibliaj tempoj: estu singardaj, ho, disĉiploj! Ne malvolvu la blankan tukon. Ne ŝtelu la korpon de la Majstro. Li ne ŝatis la mensogon. La Majstro estis disŝiranto de legendoj, li abomenis la kutimojn de la paganoj.

Sub la blanka tuko, sur la fundo de la tapiŝita tendo, ripozas ne Emilo Zola. Tie funebro ne estas. Tie ne estas morto. Tiun malvarman, putriĝantan korpon bruligu aŭ enfosu en la teron. Kaj la florojn portu al la hospitaloj, kie vere regas funebro kaj morto. La Majstro vivas. Li estis nek krucumita, nek mortinta, nek entombigita. Li estis unu spoko de la granda rado de la progresema mondo. Maleblis al li morti, kaj viva li ne sopiris leviĝi al la ĉielo. Li agadas ĉi tie, en tiu ĉi aĉa, bela kaj veriĝanta mondo.

Li staras tie, sur la monto. Je ĉiu lia vorto pli honeste svingiĝas, ruliĝas la granda mondrado. La nova *Surmonta Parolo* skribiĝis sur la kotglobon, kaj ne eblas forviŝi ĝin. *Vérité!*... La granda, brila spoko pelas la radon al la vero...

Nur animoj senpovaj estingiĝas kvazaŭ ili neniam estus brulintaj. Ho, kiel malamis li, la Majstro, la vulgarajn animojn, la komfortemajn, egoismajn, obskurajn kaj malgrandajn. Al pastraj moŝtoj, farizeoj, malveremaj kleruloj li ne kapablis pardoni. Li ne estis samaritano, kiel ankaŭ el la paganismo en li postrestis plej malmulte inter ĉiuj homoj. Li estis granda vidanto kaj granda batalanto. Li ne estus povinta krei religion. Sed se iam sur la Tero la vero fariĝos religio: tio estos triumfo de Emilo Zola...

J'accuse... Mi akuzas la vivon, ĉi aĉan, ĉi belan, ĉi veriĝantan. Iam tiu ĉi mondo iĝos saĝa, sankta, vera, riĉa kaj dia. Sed kian rekompencan la vivo donas al la Zolaoj? Kial devas milionoj plenigi la tombejojn, nutri la humon, kaj antaŭ tio larmi kaj sangi? Kial devas la Zolaoj *vidi* la veron kaj tamen suferi pro ĝi?... La mondo iam iĝos saĝa, sankta, vera, riĉa kaj dia. Kaj la Zolaoj vivis en stulta, hipokrita, malvera, mizera kaj sendia mondo... Aŭ eble estas rekompenco, ke ili antaŭpreparis *ion pli bonan*?... Ĉu la martireco estas bela?... La martireco estas bela, kaj ankaŭ la vivo estas bela. Vivi vere, verule en tiu ĉi malverema mondo, vidi, senti kaj fari la pli belan estonton: ho, kiel volupte, ho, kiel glorie!... Vivi tiel estas pli bele nun, ol estos en la estonto. Pli home kaj pli die. Kaj tiom pli por tiu, kiu ne mortis, kiel ne mortis Emilo Zola...

Lernu malami de Emilo Zola. — Malamu ĉion, kio surkuŝas la antaŭenirantan mondradon. Obskuron, bigoton, senpovon. La mondon savos ne la amo, sed tiu ĉi granda malamo, ĉar tiu ĉi malamo estas *lumo*. Ho, celo, feliĉo de veriĝanta mondo: lumo!... Neniu vin tiel adoris, kiel Emilo Zola, kiu sola estas tuta brila spoko en la antaŭeniranta mondrado. Multaj aŭdas la bruegon de la Tero kaj predikas, ke komenciĝas la nova mondo, la mondo de lumo. Vere mi diras al vi: se ĝi proksimiĝas, la nova spoko rapidigas ĝin...

...Kaj nun malplenas la mondo. Tie, en la mole tapiŝita tendo ŝvebas la animo de la mondo. Tie ĝi ŝvebas super la blanka tuko, kiu kovras malvarman, putriĝantan korpon. Tiu malvarma korpo ne estas tiu de la Majstro. Ja tiu korpo havas vitrecajn okulojn kaj ĝi estas senmova, dum la Majstro ankaŭ nun vidas kaj batalas. Tiun korpon ne ŝtelu, ho, disĉiploj. La Majstro malamamis la mensogon. Li evitis la krucon, lin evitu la legendoj. La Majstro vivas...

1902

(Benczik)

MORTO DE LA NACIIISMO

A nacionalizmus alkonya

Oni ne bezonas esti Matusalemo por povi ĝisvivi certan belegan ĉi-teran okazaĵon, ĝojindan forpason. Nia Eŭropo, mokata maljuna, sed fakte ĉiam pli juniĝanta, forpelas finfine abomenindan inkubon desur sia brusto: la naciismon.

Mi nomis ĝin inkubo, sed ĝi estas pli ol inkubo. Ĝi estas unu el la malfeliĉaĵoj de la homaro. Ĝi estas iaspeca parazita kreskaĵo de la homa kulturo, kiu ŝovas siajn radikojn tre profunde en la grundon sub la fifamaj ŝimaj palacoj en Romo, Tibeto, Moskvo, Istambulo kaj aliaj landoj. Ĝi sufokas kaj murdas per siaj milione multaj brakoj.

Kiom da historiaj maljustaĵoj jam okazis per ĝi! Kunbataligo de popoloj, lum-estingo, surtreto de la libero. Estas mirinde, ke la homaro atingis tiom, kiom ĝi efektive atingis.

Elokventaj, grandaj signoj nun anoncas, ke alvenis la tempo de ĝia likvido. Ĉie, kie la progreso ne estas nura kliŝa slogano, la popolo kun lumiĝanta animo jam prepariĝas fortamane elŝiri el la herbario de la homaro tiun ĉi venenan, parazititan kreskaĵon.

La naciismo estas furioza patriotismo. Eĉ ne tio. Kvankam la nomo „patrioto” estis jam multfoje kompromitita, tamen ĝi estas ankoraŭ ŝildo de pli sankta nocio, ol ke ĝi povu uziĝi por etikedi la naciismon. La naciismo ne estas patriotismo. La patriotismo estas tia *sine qua non* de la homo kaj socio, ke ĝin eĉ ne necesas koncizigi nocio, kaj ne necesas serĉi vorton por ĝi. Ĝi koncernas la honestajn laborantajn homojn, kiuj, vivas en komuna kulturo kaj agas en komuna socia laboro. Patriotoj ili estas, se oni volonte uzas tiun vorton. Kaj kiuj estas malamikoj de la progreso, de la strebado por

pli bona mondo, de senkondiĉa libero por la homa intelekto, tiuj estas perfidantoj de la patrujo, eĉ se ili kantadas senĉese la nacian himnon.

La mondo staras antaŭ baldaŭa senmaskigo de praa mistifiko. Ne estas hazardo, ke Pobedonoscev falas desur la ĉefprokurora trono, kaj ke la tria franca respubliko, kiel giganto, ĝuste nun morttretas konspirantan Bonapartistan formikaron, bazintan siajn esperojn en la naciismo. Kaj la laborula Germanio same nun deklaras denove, ke ĝi ne pretas apogi cezarajn frenezaĵojn, prezentatajn sub la ŝildo de furioza patriotismo. Kiel same nun avertas sian popolon la granda verkisto Björnsterne Björnson, ke ĝi ne lasu misgvidi sin far la apostoloj de naciismo disde la vera progreso kaj kultura evoluo. La mondo plenplenas je grandiozaj antaŭsignoj. Ni vidas la agonion de la naciismo.

La naciismo probable plej bone observeblas en la nigra, sed ne sekreta animo de Pobedonoscev. Li ne surmetis maskon. Li malbenis la liberon, la kulturon. Li estas pli ultramontana, ol la papoj de la mezepoko. La mondo apartenu al la caro, al la pastroj de la vera religio kaj al la slava hordo. Prefere estu milito kaj pesto, ol la popolo pensu kaj volu.

Tia estas la kruda tipo. Pli sincera, ol la Dalai-lamao, ĉiukaze multe pli sincera, ol imperiestro Vilhelmo, generalo Galifet aŭ Déroulède. Kiel la homaj socioj evoluis laŭ diferencaj vojoj, tiel ŝanĝis sian fizionomion ankaŭ la naciismo. Ĝi stultigas Otomanon en la nomo de Alaho, ebriigas francan per *gloire*, vekas malamon kontraŭsvedan en norvego, kaj volas revigi pri pangermanismo germanon. Kaj en la socioj, en kiuj kunvivas pluraj nacioj, zorgas pri aparta naciismo por ĉiu el ili tiuj, kiuj estas interesitaj ke la oligarkio floru en sia malnova aŭtoritato kaj laŭ la malnova maniero. Ĉar la naciismo taŭgas unuavice por tio, ke la amaso, ebriiĝinta per ĝi, ne rimarku, kio mankas al ĝi, kaj por kio ĝi havas rajton. En Francujo jam estus malebla la brutala sincero Pobedonosceva. Tie la ultramontanoj batas al si la bruston kiel respublikistoj. Ili eĉ flirtas kun la liberpensado. Sed ĉiu naciismo esence havas la samajn radikojn. Kaj se ni emus ironii, ni povus diri, ke ne ekzistas pli internacia forto kaj ideo, ol la naciismo.

La popoloj jam komencas vidi per la okuloj, kaj se tie kaj tie Eŭropon foje-foje superregas naciisma konvulsio, ĝi estas nura fioreo. La naciismo baraktas kontraŭ la likvidiĝo. Eble jam baldaŭ en la mondo ne plu devos honti la veraj patriotoj. Eĉ en Ruslando la likvido komenciĝis. Kaj ĉe ni — kiom longe tio malfruos?

1905

(Benczik)

LA CARO KAJ LIA AMIKO

A cár és a barátja

La caro jam konfidis neniun. Li timis eĉ la kronprincon, kvankam tiu ankoraŭ ne plenumis sian unuan vivjaron. Kiu povas scii? Eble ankaŭ li estas nihilisto. Kaj tiam la caro rememoris sian amikon, faman ĉarlatanon el Lyon, kun kiu antaŭ jaroj tiel sensukcese ili alvokis la spiriton de Petro la Granda. Ĝis la alveno de tiu amiko li enŝlosiĝis en kelo.

La Lyona scienculo prenis trajnon. Li rapidis. Li sciis, ke neniun vivulo estas apud la caro. Kaj neniun povas iel ajn enŝteliĝi al li. Do, li devas rapidi. Eĉ manĝi li ne volis dum la vojaĝo. Sed antaŭ ol alveni en Sankta Peterburgo, li malsatiĝis. Li eniris la restoracian vagonon kaj manĝis. La manĝaĵoj havis ian strangan guston. Sed li estis malsata kaj manĝis. Li alvenis. Laŭ la sekretaj instrukcioj, ricevitaj letere, li frapis sur la terura ferpordo, kiu kondukis al la kaŝejo de la caro. La caro, malferminte dekon da aliaj sinsekvaj pordoj, venis akcepti lin. Ili kune refermadis la pordojn kaj iris malsupren sur la ŝtuparo. Kaj en tiu momento: terura eksplodo. La scienculo el Lyon kaj la caro disŝirite ĵetiĝas ĉirkaŭen en la subtera kavaĵo. Al la povra scienculo el Lyon oni manĝigis dinamiton en la trajno.

1905

(Benczik)

TERTREMO

Földindulás

Terure ekstremis granda Ruslando. Kun klakantaj dentoj la mondo rigardas al Moskvo. Ĉiefalo kaj tertremego. Iam oni pilkludis per sangantaj kapoj ankaŭ sur la stratoj de Parizo. Sed eĉ en la plej teruraj latinaj revolucioj sin kaŝis iaspeca sereneco. Iaspeca facilanima kaj bela optimismo. La slavoj instruas la mondon pri nova revolucio. Tiu revolucio estas konvulsiado de la infero. Ĝi estas skue, malesperige sombra kaj terura.

Unue tondris profundo de ŝaktoj. Tiun ĉi revolucion faras la popolo. Ne estas ŝercaĵo, ĉu ne, la popolo? Ĝi scias ion, ĉu ne, kion ne eblas lerni de ĝi?

La rusa infanteriano ĵetas brulilon en la stacidomon Nikolaj, kaj kune kun sia armilo aliĝas al la plebaĉo. Kaj la plebaĉo terure multiĝas. Post kelkaj tagoj eble jam tuta Ruslando estos nura plebaĉo.

Ĉar nun jam ne sekvas kaj ne sekvos halto. Inundas ĉion tiu ĉi infero, ribel-leviĝinta el la sombraj profundoj. Eble jam flirtas ruĝa flago sur la Kremlo. Eble ankaŭ en Sankta Peterburgo regas mortiga danĝero. Eĉ armeo fariĝas plebaĉo. La plebaĉo, se ĝi volus, eble altiruŝ al si eĉ grandprincon. La plebaĉo estas terura sinjoro, kaj Filipinoj Égalité-oj troviĝos ankaŭ en Ruslando.

Kaj la mondo komprenas Ruslandon nur duone. Ĝi klarigumas la sangan kaj funebran misteron. Ke tiel kaj tiel: la carismo... Ke la oligarkio estis troa... Krome, la milito... Kaj centoj de homspecoj... La mondo havas mil klarigojn. La vero estas, ke la popolo vivas kaj konsciiĝas. La malestimata kaj mizerigita plebaĉo. Kaj Ruslando faras du

revoluciojn samtempe. La malnovan, kiun Eŭropo jam travivis, kaj la novan, kiu en Ruslando — kiel escepto, malgraŭ ĉiuj Marksoj — laboras kun sango. Kaj la rusa popolo faras ĉion ĉi kun slava krudeco, sombre, malgaje, tragike. Ĝia neimagebla forto jam donis, kaj promesas ankoraŭ neimageblajn sensaciojn al la mondo. Kaj ĝi atingos sian celon. Tra sango, ruinaĵoj, cindro, la rusa demokratio triumfe atingos la tronon. Sed ĝi venkos ankaŭ la malamikojn, pli potencajn ol la trono. La egoisman nobelan kastelon, la suferdonan fabrikon, la stultigan pastran domon kaj la senkoran kazernon. Por poste memvole kapklini al la regado de la homeco kaj civilizo.

Tiu ĉi terura tertremo estos fieraĵo de la historio. Fieraĵo, instruaĵo kaj apologio. Pri la popolo parolis jam nur senanimaj kliŝoj kaj sovaĝaj poemoj. De la popolo ne atendis konscian agon eĉ ĝiaj plej ekzaltitaj apostoloj. Jen, la proletaro redonis la popolon al la popolo. Leviĝis la popolo kaj transformas la mondon.

Tiel la popolo faras revolucion. Se ĝi movas sin, tio estas tertremo. Kaj nur la popolo scias fari revolucion. Kaj savo povas veni nur de la popolo. De la popolo, kiun ne-singardaj sinjoroj nomas plebaĉo.

Ĉu ni komparu nin al Ruslando? Sengusta kaj maljusta tasko. Tamen, ni povas tiri konkludon el la rusa ekzemplo. Putriĝintajn, kadukajn sociojn povas savi nur la popolo. La terura, nevenkebla, nehaltigebla popolo. Kaj kun la popolo oni devas interkonsenti — jam antaŭ la tertremo.

1905

(Benczik)

REFORMO DE LA PATRUJAMO

A hazaszeretetet reformja

En tiu ĉi sendia Francujo neniu leviĝas kontraŭ la Patrujo. Anatole France kaj Pierre Durand, Clémenceau kaj Jacob Lévy, Jean Jaurès kaj Henry Sansculotte: ili ĉiuj estas patriotoj.

Nek en la lernejoj oni edukas etajn kosmopolitojn. Nur oni reformis iomete tiun malbonigitan religion, kies nomo estas patriotismo. En Francujo nuntempe oni amas la patrujon alimaniere, ol ĉe la rivero Tibisko.

Kun Syveton mortis eble la lasta patrioto, kiu flaris ĉie patrujperfidon. Li estis Boulanger la 2-a, sed multe pli granda fripono, ol tiu. Li malversaciis, perversumis, mortigis sin, kaj, havante perverse-bestan animon, eble li elsputis la vivon kun la suspiro „sankta patrujo”.

En Francujo oni rimarkis rapide, kio fariĝas el la sankta ardo de homoj, kiel Lajos Kossuth kaj Garibaldi. Tromp-ulaj psalmoj de sklavistoj, brilaj kirasoj de nigraj armeoj, eskalo por senvaloraj karieristoj, azilo de friponoj, kiel lia ĉefpastra moŝto Szeberényi en mia lando antaŭ kelka tempo prilumis tion por kelkaj ruzaj kapoj.

Ĉi tie oni amas la patrujon ne plu kantante, vorto-torente, salivŝprucante kaj ebrie. Kaj oni amas ne ĝian pasinton, sed ĝian estonton. Pri la glora Ludoviko la 14-a la infanoj lernas, ke li estis senkora rabisto. Ke Jeanne d'Arc estis mania, histeria knabino, kaj Napoleono nova Attila. Ke Pasteur estis pli granda homo, ol dek militvenkintaj herooj. Tiaĵojn oni instruas, tre prudente, al la francaj buboj...

Kaj vi demandas, en kio konsistas la patrujamo, reformita laŭ la vera evangelio? En parolado, prononcita okaze de la fino de studjaro en Pariza liceo, mi aŭdis foje:

— Knaboj, travagu ĉi grandan Parizon, kaj la tutan mondon, se vi havas eblon por tio. Viaj koro kaj okuloj pleniĝos per larmoj. Kiom da malico, sencio, mizero kaj peko! Kiom granda estas ankoraŭ la nombro de subpremitoj, malgraŭ tio, ke ĉiu homo kreiĝis por esti feliĉa! Labori por la liberigo de la subpremitoj, por la liberigo de ĉiu homo: jen la celo. Kunaganta laboro de cerboj kaj manoj: jen la metodo. Ni donu justecon, lumon, feliĉon kaj belon al ĉiu homo, loĝanta sur la Tero! Ni devas krei la justecon, la novan kaj majeste homan socion. Knaboj, estu fieraj, ke vi estas francoj. Francujo ĉiam marŝis antaŭ la popoloj en la batalo por la feliĉigo de la homaro. Guste Francujo devas krei la modelon de la nova, libera kaj nobla socio por la mondo.

Jen, la nova patrujamo: la homa, popola, socia patrujamo. Inda al la homo de la dudeka jarcento. Ne la malnova: la vaka, mensoga, balastoplena. Kaj la plej nova generacio de Francujo jam edukiĝas por tiu ĉi religio.

Pli granda parto de la lernejoj jam estas laika, sekulara. Miloj de instruistoj kaj profesoroj estas liberpensuloj. Jam ankaŭ en la politiko aperas ties konsekvencoj. Antaŭ kvar jaroj la radikaluloj havis plimulton de ducent mil voĉoj. Nun tiu ĉi plimulto sumiĝas je duonmiliono. Francujo savas siajn infanojn el la ungoj de Romo kaj de la stultiga reakcio. Kaj la socia progreso ne havas alian vojon krom tiu ĉi: instruistoj kaj lernejoj. Kaj antaŭ ĉio: la reformo de la patrujamo, kaj sankta milito kontraŭ la pseŭdo-patriotismo.

1906

(Benczik)

HUNGARA PROBLEMO

Egy magyar kérdés

En mia hotelo du tagojn bruadis anglaj junuloj, vojaĝantaj al Genevo: esperantistoj. Estis la unua okazo, ke pro esperanta klamado mi ne povis dormi. Postnokte, ĉe mia hejmeniro, min kaptis sur la ŝtuparo unu apostolo de la lingvo de doktoro Zamenhof. Dum unu kaj duono da horoj li klarigadis al mi, kia trezoro estas Esperanto. „La lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizata la sole veran solvon de lingvo internacia.”* Ili foriris, dank’ al Dio, al sia Ĝeneva kongreso, sed la problemo de Esperanto restis. Jen estos do nepre tiu internacia lingvo, kiu estas „Simpla, fleksebla, belsona”.* Sed ĉu sufiĉe simpla, fleksebla kaj sufiĉe belmuzika? Se en Hungario la intelekta kulturo estus moda, cent scienculoj skribus ĉiutage pri ĉi tio. Ĉar la problemo de la internacia lingvo estas problemo hungara ĝis la bazo de la vazo. Kun nia tatara idiomato ni kaŭraĉas ĉi tie, meze de Eŭropo, kiel leporido en kavoj. Senparenca, dura, malfacila estas nia lingvo. De mil jaroj ni vivas sur tero buntpopola kaj buntlingva kaj nia lingvotalento estas apenaŭ meza. Post kvindek jaroj la hungara infano devos naskiĝi tiel, ke ĝi parolu almenaŭ angle, germane, france, ĉar male estos ega miso. Poste ĝi devos scii almenaŭ unu slavan lingvon. Verŝajne ankaŭ la japanano ĝi devos lerni. La italoj instruis iam al ni la literojn kaj kun ili ni havas ankoraŭ multon aranĝendan, do ankaŭ ilian lingvon ni bezonos... Jes ja, la hungara infano de la futuro apenaŭ havos tempon lerni ankaŭ la hungaran lingvon. Kaj ĉio ĉi ne estas ŝerco, sed plej serioza realo. Post kvindek jaroj ni malgraŭvole trafos en la intervojonoj de la interbatalantaj kulturoj, tiel ke sen praktikumado ni pereos. Laŭ la saĝo, kaj se la pensado estus nia malsano, Hungario devus stari en Eŭropo

kape de ĉia internaciismo. Nian vivon sole la internaciismo povas savi. Jen kial la problemo de la internacia lingvo estas monstre hungara problemo. Sed mi vetas je ĉiom ajn, ke serioza hungaro ne vojaĝis ĝis nun Ĝenevon al la kongreso de la esperantistoj. Francujo estas ja distingita lando kaj tamen ĝi donas la plej grandan procenton de la kultivantoj de Esperanto.

La vivo fariĝas pli kaj pli komplika kaj malfacila. Ni ne havos tempon lerni cent lingvojn. Oni devas do zorgi pri tio, ke krom nia gepatra lingvo ni povu prosperi per unu komuna lingvo. Ĉu ne hungara problemo do estas la mondlingvo? Ne centoble pli ĝi estas intereso nia ol tiu de la francoj? Estas flanka afero, ĉu Esperanto estas bona aŭ malbona internacia mondlingvo. La celo, la klopodo tranĉas en nian karnon, kiel la razilo. Decus, ke el inter ni estiĝu plej fanatikaj apostoloj de la internacia lingvo. La Iliadon, Dante-n, Hamleton, Heine-n, Ibsenon, Anatole France-n jam ankaŭ nun mi instruigus, eĉ se Esperante, en la hungaraj lernejoj. Frenezi ni devus de la ĝojo, ke ekzistas plano, kiu lude nin enŝtelos inter la kulturajn popolojn. Aŭ, se ne plaĉas Esperanto, bonvolu do iu hungara scienculo eltrovi pli bonan mondlingvon. Mi ripetas, mi ne scias kiomafoje: ĉi tio estas hungara problemo. Kvazaŭ la mapo hurlas al ni tion, se nia menso jam estas de kvieta naturo. Per unu fojo nin ellevus la mondlingvo ankaŭ el la ungegoj de la germanaro. Ĉi tio — estas hungara problemo.

1906

(Kalocsay)

* *Esperantlingve en la originalo.*

MORBUS HUNGARICUS

La ekzantema tifo, kiun la klera Eŭropo iam ekkonis el Hungarlando kaj baptis ĝin „morbus hungaricus”, nun sekvas la ekzemplon de tiuj hungaraj elmigrintoj, kiuj restis sen laboro en Ameriko: ĝi revenis hejmen. La „morbus hungaricus” alvenis, ĝi estas en sia hejmo, establiĝis, kaj senĝene oni povas nomi ĝin, eĉ se tio kontraŭdiras al la scienco — tifo de malsato. Ni sekretigas ĝin, kosmetikas ĝin, sed la situacio estas grava, kaj ĉefkapitano Boda jam presigis pri ĝi tiom da afiŝoj, ke ties kosto eventuale sufiĉus por starigo de bone instalita hospitalo. Kaj la oficialaj personoj konsolas, trankviligas la bonstatan loĝantaron de Budapeŝto. Bonvolu ne timi: tiu ĉi malsano preferas la malriĉajn „popolklasojn”. Ĝi iras nur tien, kie en unu ĉambro dudeko da homoj enspiras la pestan aeron. Kaj la bonstata loĝantaro de Budapeŝto vere ne estas tiel maltrankvila, kiel oni supozus ĉe tia epidemio. Ja finfine la danĝero estas danĝero por la malriĉaj „popolklasoj”. Tion trankvile ni akceptas; la malriĉaj „popolklasoj” por ni estas nek jako, nek sako! Tiu ĉi lasta „morbus hungaricus” estas pli malnova kaj pli terura, ol la alia.

1908

(Benczik)

PRIPLORO DE LA ŜTATO

Az Állam siratása

La Ŝtato ofte plorigis nin, povrajn, kaj tamen doloras, ke estas mi, kiu devas priplori la velkmorton de la Ŝtato, kaj ke tion mi devas fari nun. Estas vere tiel, kiel skribas eminenta amiko mia: la Ŝtato (por ne kunpuŝiĝi kun la cenzuro — la ŝtato ĝenerale) fiaskis en la Milito. Neniu povas havi konjekton, kio venos anstataŭ ĝi, sed tio verŝajne konservos ĝian nomon — kaj estos io alia. Ho ŝtato, Ŝtato, kiom belega elpenŝaĵo vi estis, kaj kiom viaj ecoj reduktiĝis al nura belo, ke nun vi frakasigos pro la manko de boneco!

1915

(Benczik)

POSTVORTOJ

„Krom tio — li estis tre granda poeto” — jene Kalocsay fermas sian artikolon, verkitan antaŭ dekkvin jaroj. Lia konstato ne estis unikaĵo ankaŭ tiam, tamen nun, okaze de la centenario de la poetgiganto vere reliefigas, kiagrade lia poezio fariĝis komuna trezoro de la tuta hungara popolo.

Sen ajna troigo oni povas aserti, ke tio estas preskaŭ ekskluzive merito de la hungara kulturpolitiko dum la lastaj tridek jaroj. Tiu ĉi aŭdaca fantomspitanto, malfacile tolerata „terura infano” de la hungara literaturo fariĝis ĉies poeto nur dum tiu ĉi lasta periodo. Kaj oni ne miru pri tio. En la faŝisma atmosfero de la intermilita Hungarlando ne povis vere populariĝi poeto, kiu nomis naciismon „unu el la mal-feliĉaĵoj de la homaro”, kiu volis reformi la perbuŝan, konservativan patriotismon, kaj kiu instigis por kunlaboro kun tiuj najbaraj popoloj, kiujn la hungara faŝismo deklaris niaj malamikoj:

Hungara trist', rumana, slava
ja ĉiam restos unu trist'.

Danub' kaj Olt ja same zumas ...

Oni povus citi pluajn versojn, preskaŭ senfine, en kiuj Ady pledas por kunlaboro inter la popoloj. Amason da artikoloj li verkis pri tiu temo, kaj tute ne estas mirinde, ke en unu el ili li pledas por Esperanto: la problemon pri internacia lingvo tre akrevide li nomas „hungara problemo”.

Kiam eksplodis la unua mondmilito, sola inter la signifaj figuroj de la hungara kultura vivo li ne lasis sin konfuzi fare

de la ŝovinismaj sloganoj: estis iom paradokse, ke ĝuste Ady, kiu iusence ĉiam vagis sur la periferio de la socio, en kiu li vivis, kaj kiun la konservativa gazetaro plej ofte etikedis „ebria kafejulo”, povis resti sobra en tiu tempo, kiam plimulto de la nacio ebruigis. Dum longaj monatoj tute sola li kontraŭbatalas la ŝovinisman fluron, iel same, kiel G. B. Shaw en Britujo.

Li nomis Emilon Zola „brila spoko de la antaŭeniranta mondrado”. Tia „brila spoko” ankaŭ li mem estis, kaj la „Ady-kulto”, kiu disvolviĝas dum la jubilea jaro en Hungarlando, omaĝas ne nur la poeton, kreinton de sennombraj belaj poemoj, sed ankaŭ la veran homon, kiu dediĉis sian vivon por elbatali pli bonan mondon.

* * *

Demandita de televidraportisto pri la eksterlanda reputacio de la hungara poezio, konata hungara verkisto, István Örkény, antaŭ kelka tempo uzis la sekvan komparon: „Mi sentas min, kiel homo, havanta en la poŝo la plej grandan diamanton de la mondo, sed kiam li volas elpoŝigi ĝin kaj montri al aliaj homoj, la diamanto kvazaŭ forvaporigis.”

Aperigante tiun ĉi malgrandan kolekton el la poemoj de Endre Ady, la redaktoro ne povas tute forpeli la timon, ke la malagraba miraklo okazos ankaŭ ĉifoje. Timinde, ke tio, kio en la originalo sonis potence, impete, en Esperanta vesto grizigis kaj banaliĝis. Mildigas tiun timon nur la fakto, ke la plimulton de la poemoj, aperantaj en tiu ĉi volumo, tradukis la plej elstara majstro de la Internacia Lingvo — Kálmán Kalocsay.

Estas bedaŭrinde, ke li ne povis ĝisvivi tiun ĉi jubileon de Endre Ady, ja tiukaze li ŝtopus per majstra mano la breĉojn, kiujn sen li ni ne povis eviti. Mankas el la kolekto pluraj grandaj poemoj de Ady, kiujn Kalocsay ial ne tradukis, kaj la du junaj tradukistoj, kontribuintaj por tiu ĉi volumo — Márton Fejes kaj Péter Rados — ne alfrontis.

Pro la neeblo prezenti pli abundan kaj pli proporcian elekton, ni trovis plej ĝusta redakta principo aperigi la poemojn

en kronologia vico. Tiu maniero, eĉ se kun hiatoj, prezentas la vojon, trairitan de Ady, kaj donas konjektojn pri tiuj verkoj, kiuj ankoraŭ atendas sian adekvatan Esperantigon.

La redaktoro, kaj ĉiuj esperantistoj, laborantaj por la aperigo de tiu ĉi volumo, esperas, ke ĝi tamen estas ne malinda omaĝo al la poeto, kiu en tre malfacilaj tempoj sciis kiel esti samtempe internaciisto kaj vera patrioto. Tiuj ecoj supozigas, ke liaj verkoj trovos la vojon al la Esperanta legantaro.

(Vilmos Benczik)

NOTOJ

- Arpada lando* — Hungarlando. Árpád estis estro, de la hungaroj en la jaro 896, kiam ili alvenis al la teritorio nun loĝata.
- Björnson, Björnsterne* (1832—1910) — Norvega rakontisto. Li akre atakis la tiutempan hungaran politikon pro ties ignoro al la kulturaj rajtoj de la naciaj minoritatoj.
- Boulanger, Georges* (1837—1891) — Franca generalo, ministro pri militaj aferoj. Li partoprenis en la subpremo de la Pariza Komuno. Dum la okdekaj jaroj li organizis komploton kontraŭ la franca respubliko. Pro faritaj punjuraj deliktoj li fuĝis al Bruselo kaj tie mortigis sin.
- Csokonai Vitéz* (ĉolkonai vi!te:z), *Mihály* (1773—1805) — La plej granda poeto de la hungara klerismo. Li vivis longtempe en Debrecen.
- Deroulède, Paul* (1846—1914) — Naciisma franca poeto, dramisto kaj politikisto.
- Dózsa* (do:ŝja), *György* (?—1514) — Etnobelo, gvidanto de hungara kamparana ribelo en la jaro 1514. La ribelo estis subpremita, Dózsa mem torturita kaj ekzekutita.
- Filipo Égalité* — Reĝa princo, kiu dum la granda franca revolucio aliĝis al la revolucia movado. Poste la jakobenoj ekzekutis lin.

Gallifet (1830—1909) — Franca generalo, subpreminto de la Pariza Komuno.

Ganges — Rivero en Hindujo.

Himfy (hi!mfi) — Ama poemciklo de la hungara poeto *Sándor Kisfaludy* (vd.)

Jaurès, Jean (1859—1914) — Unu el la gvidantoj de la franca socialista partio. Atencanto mortigis lin pro lia kontraŭmilita aktivado.

kalvinana Romo — Dum longa tempo oni tiel kromnomis la hungaran urbon Debrecen, kie funkciis pluraj instancoj de la hungara kalvinana eklezio.

Kisfaludy (ki!ŝfaludi), *Sándor* (1772—1844) — Hungara poeto, tipa minora talento kun konservativaj inklinoj.

Kiss (kiŝ), *József* (1843—1921) — Hungara poeto kun ne tre elstara talento, redaktoro de la tre grava semajngazeto „Hét”. (Vd. en Hungara Antologio.)

Kossuth (ko!ŝut), *Lajos* (1802—1894) — La plej elstara politikisto de la batalo por la nacia sendependeco kaj progreso dum la 19-a jarcento. Ĉefa figuro de la liberecbatalo en 1848—1849. Inter aprilo kaj aŭgusto de 1849 prezidanto de la unua hungara respubliko. Post la falo de la sendependa Hungario li elmigris, sed ĝis la fino de sia vivo li havis influon al la hungara politika vivo.

„*kun sep prunarboj*” — En Hungarlando oni etikedis tiel malriĉiĝintajn nobelojn, aludante pri la malgrandeco de ties bienoj.

Leda — Amatino de Endre Ady. Ŝi havis nemezureblan meriton en tio, ke Ady fariĝis granda poeto.

morbus hungaricus — (latine) hungara malsano.

Nagykároly (na!djka:roj) — Iama hungara urbeto, nun nomata Carei, kaj apartenanta al Rumanujo.

Nagyvárad (naldjva:rad) — Iama hungara urbo, nun nomata Oradea, kaj apartenanta al Rumanujo.

Olt — Rivero en Rumanujo.

Partium — (latine) „Partoj”; teritorio, kiu situas oriente de la rivero Tibisko. Ĝi apartenis al la iama Princlando Transilvanio.

Petro la Granda (1672—1725) — Rusa caro, kiu multe strebis por modernigi Ruslandon kaj fari ĝin Eŭropa potenco.

Pobedonoscev (1827—1907) — Ĉefprokuroro de la rusa sankta sinodo, fifama reakcia naciisto.

Sankta Peterburgo — Nomo de Leningrado ĝis 1917.

Szilágyság (si!la:djŝa:g) — Historia regiono en Transilvanio, nun apartenanta al Rumanujo.

Tibisko (Tisa) — La dua plej granda rivero de Hungarlando.

Transilvanio — Historia regiono, iama sendependa princlando, nun apartenas al Rumanujo.

ultramontana — Estis nomataj tiel la adeptoj de la papa kaj eklezia, trereakcia politiko.

Vajda (va!jda), *János* (1827—1897) — Hungara poeto, unu el la pioniroj moderna hungara poezio. Ady tre alte taksis liajn poemojn. (Vd. en Hungara Antologio.)

Wolafka (vo!lafka), *Nándor* — Pastro, tiutempe kanoniko en la urbo Nagyvárad.

Zilah — Iama hungara urbeto, nun nomata Zalaŭ, kaj apartenanta al Rumanujo.

ENHAVO

Endre Ady (<i>Kálmán Kalocsay</i>)	5
--	---

Poemoj

Admono al la gardantoj (<i>Kalocsay</i>)	59
Alflugis la pavo ... (<i>Szilágyi</i>)	17
Antaŭ la Morgaŭon (<i>Kalocsay</i>)	29
Antaŭ princo Silent' (<i>Kalocsay</i>)	19
Aŭtuna bruo (<i>Kalocsay</i>)	16
Batalo kun la Grandsinjoro (<i>Kalocsay</i>)	12
Ĉe sinistro Dia (<i>Rados</i>)	33
De Er' ĝis Oceano (<i>Rados</i>)	30
Ĉe Tibisko-bordo (<i>Rados</i>)	10
Forportas la Sinjor' kiel Elion (<i>Kalocsay</i>)	31
Freneza, morta nokto (<i>Kalocsay</i>)	45
Iu nun, iu nun min memoras (<i>Szilágyi</i>)	51
Kanto de hungara jakobeno (<i>Kalocsay</i>)	38
Kanto kronika el 1918 (<i>Kalocsay</i>)	60
„Kie vi, Adamo?“ (<i>Kalocsay</i>)	32
Konservi vin ... (<i>Kalocsay</i>)	9
Krucifikso en arbaro (<i>Kalocsay</i>)	35
La alveno de Dio (<i>Kalocsay</i>)	36
La animoj lazitaj (<i>Rados</i>)	11
La dronintaj vojoj (<i>Szilágyi</i>)	49
La granda diboĉo (<i>Kalocsay</i>)	57
La granda Kasisto (<i>Kalocsay</i>)	22
La leĝo de la granda Mano (<i>Kalocsay</i>)	28
La Mesioj hungaraj (<i>Rados</i>)	18

La morto de la ĉielarko (<i>Kalocsay</i>)	46
La stelo de steloj (<i>Baranyai</i>)	40
La ŝtelinto de mia sorto (<i>Szilágyi</i>)	53
La trombono de Dio (<i>Kalocsay</i>)	37
Maria kaj Veronika (<i>Kalocsay</i>)	25
Mortoflor': la kiso (<i>Kalocsay</i>)	42
Neĝmontoj kaj Riviero (<i>Kalocsay</i>)	23
Nepo de Georgo Dózsa (<i>Fejes</i>)	41
Petego pri rido (<i>Kalocsay</i>)	50
Plori, plori, plori (<i>Kalocsay</i>)	15
Post maja pluvego (<i>Kalocsay</i>)	44
Rememoro pri nokto somera (<i>Kalocsay</i>)	55
Sango kaj oro (<i>Fejes</i>)	24
Sonĝo pri abelejo (<i>Kalocsay</i>)	26
Sub la montaro Neĝarĝent' (<i>Kalocsay</i>)	47
Sur tablo-trono (<i>Kalocsay</i>)	21
Sur vinmonto de jaroj foraj (<i>Kalocsay</i>)	14
Virinoj sur la bordo (<i>Kalocsay</i>)	20

Artikoloj

Aŭtobiografio (<i>Benczik</i>)	62
Hungara problemo (<i>Kalocsay</i>)	76
La caro kaj lia amiko (<i>Benczik</i>)	71
Malgranda promeno (<i>Benczik</i>)	65
Morbus Hungaricus (<i>Benczik</i>)	78
Morto de la naciismo (<i>Benczik</i>)	68
Priploro de la Ŝtato (<i>Benczik</i>)	79
Reformo de la patrujamo (<i>Benczik</i>)	74
Strofoj (<i>Benczik</i>)	66
Tertremo (<i>Benczik</i>)	72
Postvortoj (<i>Vilmos Benczik</i>)	80
Notoj	83
Enhavo	86